

REVUO

Monata Aldono al Esperanto Triumfonta

NUMERO 8

1923

JUNIO

MI LIBERIGOS.

Rigardu, kiel de tie, post montoj, leviĝas la matena lumo! Rigardu, kiel ĝiaj radioj — simile al riveretoj printempaj — fluadas malsupren laŭ la flankoj de l' montoj! Kaj tie de la altaj montoj etendiĝantaj ĝis la ĉielo sonas mallaŭta kanto: kiel bruo de printempa arbaro aŭ plaŭdo de ekdormanta maro — tiel ĝi sonas ... Kaj tie oni kantas pri verda printempo, pri flora juneco, pri ora matena lumo kaj pri la brila suno ...

Mi scias — tie loĝas homoj, kiuj liberigis el la katenoj de mizera mondo kaj kiuj sukcesis tien penetri, batalante kaj disrompinte la katenojn — tie regas eterna verda printempo, tie neniam estingiĝas la ora lumo matena kaj la brila suno neniam malleviĝas. — Feliĉaj homoj. — Kiel en sonĝo mi vidas amason da homoj junaj kaj maljunaj, sur la deklivoj de l' monto, rampantaj supren. Iliaj vizaĝoj estas palaj, iliaj vangoj malgrasaj, sed el iliaj okuloj brilas entuziasma fajro, kaj deziregante ili rigardadas malproksimen ...

Ili rapidas al la suno, kondukanta ilin en la landon fabelan, kie ili imagas trovi la feliĉon, deziritan kaj serĉitan jam de longa tempo ...

Ne malpermesu al mi penetri al la ora matenasuno, kiu lumigas la altajn deklivojn! Ankoraŭ en mia brusto bolas ondanta sango, en mia animo ankoraŭ flamas la batala fajro, kaj ankoraŭ mi sentas min juna, ankoraŭ troviĝas forto en mia korpo kaj la volo en mia brusto — bataladi. Tial antaŭen! Mi ne volas atendi plu — mi volas liberiĝi! Vi lasu min penetri kune kun kamaradoj trans la montojn, for de turmento — al idealoj. Al idealoj?! Vi ridetas, ĉar vi ne scias, kio estas idealoj — vi rigidaj homoj! Ĉar ilin havi povas nur tiuj, en kies brustoj bolas kaj ondas la sango kaj flamas fajro batala, nur tiuj, kiuj sentas la volon kaj forton bataladi ...

Rapide al la celo! Mi liberigos min!

Batalanto.



La granda striko.*)

De I. Gorbunov-Posadov.

Rim. de red. Pro speciala deziro de l' tradukinto ni neniam ŝanĝis la lingvon de l' traduko kaj plene konservis ĝin tia, kia ĝi estis, kvankam ni ne aprobas kelkajn formojn.

I. Ĉe la frontoj.

Neniu memoris, kiel ĝi komenciĝis,
Kiel ĉi tiu unua aref' da soldatoj,
Levinte blankan standardon,
Elvokis al si malamikajn soldatojn
Kaj, ĵetante for la pafilojn, deklaris:
— Ni ĉesigas la militon.

Mortigu nin, se vi volas, sed ni ne plu pafos vin,

Ĉar estas vi nia frataro!

Ankaŭ vi ĵetu for la pafilojn,
Kaj vivu la paco, kiun ni faros hodiaŭ
kun vi, por eterne!

Neniu memoris bone, kiu estis l' unua soldato, alvokinta por tio ĉi la kamaradojn el ambaŭ armeoj.

Pri li sciis nur la ĉielaj birdoj, per bekoj pinĉintaj poste la okulojn el lia senviva korpo, kuŝinta kiel krucumito kun dismetitaj manoj, kun tri kugloj en la koro, inter la du linioj da tranĉeoj.

Pri li sciis nur la brilinta super li granda ĉielo, kun senlima amo rigardinta la sango-kovritan kadavron de ĉi tiu unua martiro, falinta sur la bataalkampo ne por ies potenco, profito, malamo, sed por l' universa frateco.

Preskaŭ ĉiuj-ĉi pacoherooj estis samloke mortigitaj laŭ la ordono de l' estraro kun preskaŭ ĉiuj fratiĝintaj al ili malamikaj soldatoj.

Tamen ilia alvoko, tamen la sciigo pri ilia ago, kiel elektraj fajreroj, traflugis la vicojn de ambaŭ armeoj, starintaj jam multajn semajnojn unu kontraŭ l' aliu, tago post tago beste ekstermante unu l' aliu.

Kaj post ĉi tiu unua aref' da herooj, malgraŭ ĉiuj mortpafoj, ĉiuj kamptribunaloj, tuj komencis kuniradi unu al la aliu el ambaŭ flankoj novaj kaj novaj aretoj da soldatoj, poste tutaj duonrotoj, rotoj, bata-

lionsoj, — tutaj regimentoj, fine ĵetante for la armilojn kaj deklarante:

„Ni ne plu interbatalos, ĉar estas ni fratoj!“

Ili estis dispelataj per pafado, per kanonoj, sed tamen la nombro ilia estis pligrandiĝanta kun terura rapido, kaj fine nenio jam estis farebla kontraŭ ili!

La soldata uniformo estis forfalinta de sur la homa animo, kaj anstataŭ soldato aperis frato-homo, por kiu miloble pli facile estis morti, pafita pro l' rifuzo esti milita mortigisto, ol mortigi fraton-homon.

Kiel flamo disblovata de furioza vento sin portis la vekiĝinta konscio pri frateco tra la vicoj de ambaŭ armeoj, ekregante milojn, milcentojn da homoj.

La kanonviando subite komencis rezoni, kaj soldato estiĝis homo.

— Sufiĉas! Ni estas ne malamikoj, sed fratoj, — nur fratoj!

Ni estas homoj, sed ne viando por la kanonoj!

Sufiĉe!

Kiu estis la unua ekkriinta tiujn vortojn, neniu preskaŭ memoris. Sed ĝi elŝiriĝis fine, ĉi tiu krio, el la troturmentita brusto homa kaj leviĝis al la ĉielo kaj, kiel birdo elŝirinta sin al libero, al ĉiela vasto el kaptiloj, ĝi alte sin portis super la homaro.

Tuta dispremita per la milito, tuta disŝirita je sangozaj ĉifonoj, tuta kadukigita, ĝi ne mortis, la animo homa, en la sango-kovrita soldato.

Gi subite leviĝis en li,

Reviviĝinta,

Kaj ekkriis super la tuta mondo:

„Sufiĉe! Sufiĉe!“

Mi ne volas plu, — mi ne povas esti mortigisto!“

Kaj super ĉiuj armeoj subite trapasis ĉi tiu spiro de frateco, leviĝis en ĉiu soldata koro la granda homa fizionomio — la animo, kiu ne povas ekzekuti, mortigi, vundi, kripligi, turmenti, kapti, kunligi, bati, ofendi vivan, spirantan, parencon homan estulon.

*) El la verko de Gorbunov-Posadov „La Homliberiĝo. Poemo pri l' dudeka jarcento. Libro unua. Oro, fero, sango aŭ amo“ p. 156 kaj sekv.

Kaj subite ĉio haltis. Subite eksilentis ĉiuj furioze blekegintaj ne ĉesante faŭkoj de l' paflegoj. Subite eksilentis la krima, abomena, maldigna, seka krakado de l' pafila mortigado.

Milionoj da homoj, ĝis tiu momento blinde, sklave obeadintaj al siaj oficiroj, generaloj, ĉefkomandantoj, imperiestroj, prezidantoj, milionoj da homoj subite forĵetis de sur siaj okuloj la sangan vualon, la sangan blindon, la sangan rigidon.

Milionoj da sklavoj subite forĵetis de si la sangizitan bastonon.

Kaj ekkriis al siaj regantoj:

— Kiu donis al vi rajton je l' vivo homa?

La vivo — ĝi estas sanktaĵo,

Kaj kontraŭ ĝi neniam plu leviĝos nia mano!

Niaj manoj neniam plu estos en sango homa.

Aŭskultu vi ĉiuj regantoj, antaŭaj sinjoroj niaj:

„Neniam plu!“

Ĉar ne ekzistas plu tia trompilo, ne ekzistas plu tia forto en la mondo, kiu devigus nin esti fradmortigistoj!

Kaj malestiĝis malamikoj, kvazaŭ ili estus eĉ neniam ekzistintaj.

Ili neniam ja ekzistis, ĉar ja nur reĝoj kaj estroj asertadis la soldatojn el ambaŭ flankoj, kamparulojn kaj laboristojn, ke ili estas malamikoj unuj al la aliaj.

Kaj degelis l' armeoj, kiel neĝo sub la varmega spirado de l' printempo.

Kaj diskuris la soldatoj al hejmoj —

Al plugiloj, al stabloj,

Al sopirintaj pri ili patrinoj, edzinoj, infanoj.

Kaj restis solaj la estroj,

Kaj en teruro kuris ili for de la batalkampoj, restinte solaj inter milionoj da kadavroj de homoj buĉitaj de ili, inter vilaĝoj forbruligitaj de ili kaj urboj prirabitaj kaj ruinigitaj de ili.

Ili kuris, kiel Kain'oj, persekutataj senĉese de la pelantaj ilin sangokovritaj fantomoj de iliaj sennombraj viktimoj.

II. En la postfrontejo.

La pafiloj ĉe l' frontoj estas tutfrakasitaj.

La kanonoj estas forĵetitaj de sur l' antaŭaĵoj kaj kuŝas, ŝovinte en la teron

la mutiĝintajn sangekovritajn faŭkojn, el kiuj neniam plu aŭdiĝos eĉ unu pafo.

Sed tamen post la tranĉeoj, je centoj da kilometroj post ili, frapas ankoraŭ centoj da fabrikomarteloj, batante metalon por produkti milojn da novaj gigantaj kanonoj.

Brusonoras ankoraŭ centoj da fornegoj, en kiuj estas fandata ŝtalo kaj kupro por milionoj da gigantaj kuglegoj.

Flagras ankoraŭ centoj da fornoj, en kiuj estas fandeverŝata ŝtalo por milionoj da pafituboj kaj da kanonoj.

Frapas ankoraŭ per miloj da maŝinoj la kuglofabrikoj, kaj milcentoj da homaj manoj ŝutas morton por fratoj-homoj en ŝtalajn ujojn.

Kaj al la frontoj moviĝas ankoraŭ milcentoj da vagonoj pleneŝarĝitaj per kuglegoj, kaj veturas mildekoj da ĉaroj plenigitaj per kanonoj, kanonkuglujoj, sabroj kaj revolveroj por mortigo al milionoj.

Milionoj da fortaj labormanoj el ĉiuj flankoj ankoraŭ pretigas kaj veturigas el ĉiuj ekstremoj la ruĝan malnoblan morton.

Sed subite l' aero ektremis pro l' krio:

— Sufiĉe! Sufiĉe!

Halt', kamaradoj!

Ĉiuj! Strik'! Halt'!

Kaj la muroj de l' mortfabrikejoj ektremis pro tiu ĉi krio.

Kiel ribela ŝtormo, ĉion foriganta dum sia voĵiro,

Kiel giganta ondo de monda superakvego,

Invadis ĉien la kri':

— Sufiĉe! For la martelojn! Lasu for la fornojn! Forĵetu la stablojn!

Sufiĉe prepari morton por fratoj-homoj! Sufiĉas!

Kaj la uzinfajfiloj ekfajfis, vokante la laboristojn al la granda striko.

— Sufiĉe estis ni pretigantaj ilojn por bestagoj kaj mortigo.

Ne, pli bona estas promalsata morto, pli bone mortu pro malsato ni ĉiuj, niaj edzinoj, infanoj, sed neniam plu estos ni laborantaj por la fradmortigo.

Eĉ unu kanono ne estos plu fandverŝita per laborista mano.

Eĉ unu pafilo ne estos plu farita de laboristo. Eĉ unu kuglo ne eliros plu el

sub laborista mano, ĉar neniu laboristo deziras daŭrigi Kain-estadon.

Kaj el sub la tero, el la profundoj subteraj aŭdiĝis la voĉo de l' reviviĝinta laboristaro, kiel eksplodo de tertremo ekskuinta la teron.

— Sufiĉe! Sufiĉe! Ni, ministoj, deklaras, ke depost nun ni neniam donos eĉ unu metalopecon, eĉ unu pecon da karbo por la fornoj, en kiuj estas fandverŝata morto por frato-homoj.

Eĉ ne unu polveron da metalo kaj karbo por kanonoj kaj kuglegoj.

Eĉ ne unu polveron da karbo por la lokomotivoj kaj ŝipoj, kiuj veturigas soldatojn kaj kuglegojn, veturigas morton al frato-homo.

Eĉ ne unu svingon de nia martelo por iu ajn afero, bezona por la milito.

Ni preferas morti pro malsato ĉiuj ol doni eĉ unu polveron por fratomortigo! Sufiĉas!

* * *

Kaj ĉio haltis.

Silentiĝis la gigantaj marteloj de l' kanono-uzinoj,

Estingiĝis iliaj ardantaj fornoj,

Malviviĝis la fum' en la tuboj de l' armilkaj kugleg-fabrikoj.

Kiel dezertaj sabloj, mutiĝis la senombraj kazernoj, ĵus bruegintaj pro miliono da soldatoj sin pretigintaj, kiel frenezuloj, mortigi unu l' alian.

Haltis la sennombraj kanonoj, kuglegoj, armilaj uzinoj, kie miloj da labormanoj ĵus estis tage kaj nokte laborantaj por preparadi morton al milionoj da vivoj homaj.

Kiel senparolaj tombejoj senviviĝis ĉi tiuj teruraj metiejoj, kie tage kaj nokte amasoj da laboristoj-sklavoj por funto da viando estis pretigantaj pafmortigadon al popoloj.

Kiel senspiraj longaj serpentoj senviviĝis sur la reloj lokomotivoj kun senfinaj ŝarĝvagonoj da kanonoj kaj kuglegoj.

Sur la vojoj antaŭ la havenoj haltis vagonaroj veturigintaj al vaporŝipoj militajn ŝarĝojn.

Senviviĝis sennombraj kudrejoj, kie miloj da laboristoj estis tage kaj nokte kudrantaj vestaĵojn por soldatoj, sennombraj bakejoj, kie miloj da bakistoj estis tage kaj nokte knedantaj panon por ili.

Haltis, senviviĝis, mortis ĉio, kio estis armanta, veturiganta, vestanta, nutranta l' armeojn, — tiujn milionojn da kompatindaj homaj estuloj transformitaj je maŝinoj por mortigo, — tiujn milionojn da malfeliĉaj sklavoj vestitaj ĉiuj per egalaj punlaboraj soldato-vestoj kaj destinitaj esti hommortigistoj.

Ruiniĝis la regno de l' ruĝa Diabolo de Fratomortigo.

Kun permeso de l' aŭtoro
Esperantigis J. Zilberfarb, Ĥarkov (Ukrainio).

Unu paĝeto el la jaro 1921.

Malgranda novelo.

La varmega kaj fajrega suno malrapide jetis siajn radiojn sur malĝojan „Povolĵje“ (apudvolga regiono), kvazaŭ rigardante je tiu terura laboro, kiun ĝi faris. Ĝia laboro efektive estis kruela kaj malbona. Tutaj kampoj estis forbruligitaj kaj dezertigitaj. Neniu kaj nenio ricevis kompanion de la senkompata suno. La multaj vilaĝoj kaj vilaĝetoj estis kvazaŭ senvivaj, kaj oni vidis aŭ aŭdis nenion.

Malĝoje kaj peze estis en iu vilaĝdomo de malgranda vilaĝeto en la „samarska“ distrikto. La morto jam mastrumadis

dome, kaj nur la estro de l' domo estis ankoraŭ duonviva, la aliaj anoj de l' familio jam estis mortintaj hodiaŭ. Al li la morto nur surmetis sian piedegon, kaj li estis mortonta. Antaŭ sia morto li rememoris pri la estinteco, kaj bildoj el lia pasinta vivo preferiris antaŭ li. Bone kaj feliĉe vivis lia familio en pasintaj jaroj; ĉio estis en bona stato. Sed jen venis la eŭropa milito kaj pereigis du liajn filojn, kaj pro tio li rapide maljuniĝis. Poste ekestis la terura jaro 1921 kun senfrukto, senpluveco, sekeco kaj morto por

homoj kaj bestoj; kaj kiam alvenis la aŭtuno, estis nenia rikolto je grenoj, fruktoj kaj fojno; homoj komencis ŝteli unu de l' alia nutraĵojn. La domestro memoras, ke li mem kelkfoje ŝtelis manĝaĵojn por sia familio de najbaroj. Kiam alvenis la neĝa kaj frosta vintro kaj ĉio ĉie estis kovrita per neĝo, la situacio de l' vilaĝanoj fariĝis eĉ pli malbona, kaj ili komencis manĝi mortintajn vilaĝanojn de sia vilaĝeto. Denove li rememoris, ke, kiam ie mortis homo, tie liaj najbaroj dividis la

karnon de l' mortinto por manĝado. Poste ankaŭ tiu ĉi „viando“ ne estis sufiĉa; ĉar kiam iu mortis, liaj propraj familianoj formanĝis lin; kaj hodiaŭ al li, la domestro, mortis la edzino kaj filino, kaj li mem estas mortonta.

Kiam venis la vespero, la domestro estis senviva, kaj la sekvintan matenon en la domo la korpoj estis malaperintaj, ĉar oni forŝtelis ilin por manĝado.

Laŭ la terura realeco rakontis
A. *Voločov*, Tambov, Rusl.

Siciliaj vidindaĵoj.

Neniu regiono estas dum la jarcentaro tiel multe dezirita kaj pridisputita kiel Sicilio, kies klimato kaj fruktodoneco ĉiam allogis popolojn. Efektive la grekoj jam en antikvaj tempoj sukcesis fondi urbetojn tie, kiuj poste multe floradis; post batalo ĉe *Himera* (480 a. K.) la urbo Sirakuzo (*Syracusae*) sukcesis havi sur ili politikan estrecon. Ankaŭ laŭ arta vidpunkto la sirakuza influo fortege montriĝis.

Pli interesaj ankoraŭ ol la historiaj okazintaĵoj estas la legendoj, kiuj ilin akompanas. Laŭ la antikva mitologio, kiam dio Plutono (*Pluton*) en sicilia ebenejo kaptis Prozerpinon (*Persephone*, *Proserpina*), dum ŝi kolektis florojn kaj ŝin kunportis al la Infero, nur la nimfo *Cyane* kontraŭstaris kaj klopodis helpi la diinon. Tamen vana estis ĉiu peno kontraŭ la forto de l' infero, kaj la nimfo estis ŝanĝata je fonto.

La vojaĝanto, kiu post restado en Sirakuzo detale vizitas la ĉirkaŭaĵon de la urbo, ankoraŭ nun povas vidi la antikvan fonton, pri kiu aludas la legendo, kaj la rivereton, kiu el ĝi naskiĝas. Alta kaj kreskeganta aro da papirusoj, precipe belaj aŭtune, flankumas la rivereton en ĝia supra parto, kaj tiujn ĉi montras nia bildo.

Kiel konate, la papiruso (*Cyperus papyrus*) estas egiptodevena kreskaĵo: ĝiaj

radikoj profundiĝas teren sub la akvo, ĝia trunketo gracie kurbita finiĝas per tufo da verdaj filamentoj, kiuj ŝajnas hararo. El ĝi oni fabrikis antikve la skribŝtofon (la nomo de la papero devenas ja de tiu de la papyruso); sed ŝajnas, ke la papero estas farita el la „klera“ kreskaĵo nur en Egiptio. La procedo estis tre malfacila kaj postulis multe da tempo kaj akurateco; ankaŭ nuntempe nur malmultaj personoj sukcesis apliki en Sicilio la fabrikprocedon (prikribitan de *Plinius*, Nat. Hist. XIII, 23) al



La fonto Cyane kun la papirusoj.

la nun kreskantaj papirusoj, sed kompreneble tiu papero estas nur kuriozaĵo.

Norde alia spektaklo mirigas la fremdulon. Grandega greka teatro, konstruita kvin jarcentojn antaŭ Kristo, perfekte konservita, revivigas en nia fantazio la antikvajn gloriojn. Dezerta kaj senbrua hodiaŭ ĝi estas, sed iam sur ĝiaj ŝtupoj sidis Eŝilo (Aischylos), Pindaro, Platono; en ĝi Timoleono, la saĝa kondukanto, maljuna kaj blinda, parolis al la samurbanoj incitante ilin al la milito kontraŭ la kartaganoj. Nun ofte dum printempo la antikvaj spektakloj renoviĝas; eble ankaŭ tiun ĉi jaron la ŝtuparoj pleniĝos, kaj oni povos, sidante sur ili, ree aŭskulti ian ĉefverkon de greka tragediisto.

Elio Migliorini

Popola amuzado en Londono.

Kion vi diras, mia norvega amiko, vi volas vidi, kiel la laboristoj amuziĝas dum publika festtago en Londono? Mi estas je via dispo. Hodiaŭ posttagmeze mi kondukos vin al „Happy Hampstead“ (Feliĉa Hampstead).

Je la dua ni promenas ĝis tubstacio (subtera fervojo). Mi petas mian amikon enpaŝi en lifton, jam preskaŭ plenan, kaj tuj la lifto malsupreniras en la internon de la tero. Malsupren, malsupren ... Ĝi haltas; ni eliras el la lifto kaj troviĝas en tunelo, kiun ni trairas, kaj baldaŭ estas sur la perono. Vagonaroj kuras ĉiudumminute, do ne necesas longe atendi. La perono estas homplena, kaj ĉiuj interpuŝiĝas por eniri la jam plenajn vagonojn. Konduktoro krias: „Rapidu!“ kaj senprokraste signalas, ke ĉio estas en ordo por forveturo. Vagonaroj ne haltas longe en stacioj, venas kaj tuj foriras. Pasaĝeroj devas rapidi, ne estas permesate rampi. Multe da veturantoj devas stari tenante rimenojn pendantajn de plafono. Vi diras, ke belaj estas la vagonoj. Jes, ili ja estas tre luksaj: la sidlokoj, kun brakapogiloj, estas bone remburitaj kaj taŭgas eĉ por la plej elektema homo.

Dumtempe la elektra vagonaro rapide kuradas, kaj baldaŭ ni estas ĉe Hampstead. Ŝajne ĉiuj eliras, apenaŭ ni forlasis la peronon, — jam alvenas alia vagonaro kun sia ŝarĝo da homoj. Forta vento, farata per specialaj ventoliloj, blovas en la tubstacio. Kvar grandaj liftoj, kiuj povas porti po cent personoj, rapide funkcias; premataj de la homamaso, vole nevole, ni estas enpuŝataj en unu; baldaŭ la lifto supreniras, kaj ni atingas la elirejon ĉe la strato. Profunda estas la liftŝakto.

Nun ni troviĝas ĉe bazo de deklivo, ĉe kies flankoj estas butikoj; la vojo al la erikejo. Vendistoj de ludiloj krias proponante multkoloran ĵokean ĉapon kun kano, balonojn diverskolorajn kaj aliajn infanludilojn. Jen staras blindulo, kiu per muzikilo faras malgajajn sonojn, petante almozon; jen surstrata artisto, kiu per varikoloraj kretoj faras bildojn sur trotuaro, esperas,

ke preterpasantoj donacos al li monon. Ĉe la supro de la deklivo instalas sin diversaj ĉarlatanoj, kiuj floras dum tiaj festotagoj. Manlegistino, en multkolora vestaĵo, brodita je imitaĵoj kaj perloj, iam nova, sed nun velkinta, kun ĉapelo surhavanta briletaĵojn, petas ke oni lasu al si antaŭdiri la sorton; — ŝi asertas, ke ŝi estas „La sola reĝino Ŝeba Li, ne estas alia Ŝeba Li en la mondo“. Viro desegnas profilon de via vizaĝo, tute vivsimilan; ĉirkaŭ pulĉinelo staras multe da homoj kaj geknabetoj, kiuj eksplode ridas pro sensenca interbatado de la marionetoj; ankaŭ multaj surstrataj fotografistoj petas ke vi pozu. Multaj kaj diversspecaj estas tiaj ĉarlatanoj.

Jam vidiĝas la erikejo, vasta ondanta herbejo, tie kaj ĉi tie punktita per arboj: sur la herbejo troviĝas miloj da homoj. Apud la vojo vidiĝas artefarita lago por geknaboj, kiuj dum somero velveturigas boatetojn sur la akvo. Nun geknaboj, kun pantalonetoj kaj juvoj suprentiritaj, staras en la akvo kaj penas nepre trovi kuprajn monerojn, ĵetitajn de ĉirkaŭstarantoj en la lagon. Levinte la okulojn, vi vidas vastan horizonton; sube en granda valo pace kuŝas ĉirkaŭurboj de la granda Londono, ja rava vidaĵo. Por antaŭeniri ni devas trabori homamason, homoj ĉirkaŭas nin kiel muŝoj poton da mielo. Mia amiko altiras mian atenton al granda ilekso, kies ore flava floraro, ŝajne, proklamas la printempon.

Jen ni jam estas en la mezo de amuzlando, kie rivero da homoj antaŭen kaj reen interpuŝiĝas. Tie staras centoj da standoj, budoj, karuseloj, svingboatoj, turoj, „alpaj montoj“, elektra skuigilo nomata „Palais de dance“, hazardludejoj ktp. Ĉe la hazardludejoj aŭdiĝas: „Provu vian lertecon, sinjoro, tri pilkoj por du pencoj! Faligu ses keglojn, kaj vi ricevos premion!“ La kegloj estas bazepezaj, pro tio sukceso malofta. Alia cigano krias: „Piedfrapo po penco! Krevigu balonon per piedfrapo, bonaj premioj!“ Junuloj tre ŝatas tiel gajni objektojn, kaj ofte ili, aŭ iliaj kunulinoj, portas premiojn el

vitro kaj fajenco kun vulgarej koloroj, kvankam ili tute ne bezonas tiujn objektojn. Ekstere de iu budo oni legas: „Virino kun ursa vizaĝo, la plej stranga kaprico de naturo. Enirprezo tri pencoj“ Ekstere de alia budo: „La plej malgranda homo en la mondo, 22 colojn alta, posedas ĉiujn homajn kapablojn, vidu lin, ĉar estas la lasta vizito en Londono.“ Kiel atesto de lia malgrandeco pendas ĉe la pordo aro da vestaĵoj pupaj.

La karuseloj estas movigataj per elektro, kaj iliaj orgenoj knare ludas ariojn de popularaj kantoj. Gejunuloj gaje rajdas la galopantajn ĉevalojn: knabineto, nesciante ĉu plori ĉu ridi, firme tenas la stangon ĉe la ĉevalo pro timo, ke ŝi falos dum la rondraĵo.

Mia amiko denombros almenaŭ duonmilionon da homoj sur la erikejo.

En malproksimo okazas sportoj: gejunuloj konkure kuradas por premioj. Tie orkestro ludas blovmuzikilojn.

Kio okazas ĉe tiu homamaso? Ni aliru, ĉu? Jes, certe. Ni vidas viron, kiu ludas akordionon, dum juna virino kaj viro gaje dancas nacian dancon, samtempe

kantante. De tempo al tempo la junulino petole suprentiras angulon de sia jupo, kaj la ĉirkaŭstarantoj ridegas, vidante ŝian ŝtrumpligilon.

„Kie estas viaj ebriuloj?“ rimarkas mia akompananto, „neniun mi vidis aŭ vidas eĉ ebrieta.“ — Nuntempe en Anglujo oni trinkas alkoholaĵojn tre modere, mi dubas ĉu vi vidos iun ebria, kvankam estas festotago publika.

Ni supreniras monteton, de kie multaj homoj admiras la belan perspektivon de Londono: sube etendiĝas grandaj konstruaĵoj, kaj malproksime vidiĝas la Kristala Palaco, pli ol 35 kilometrojn for. Sur tiu monteto estas starigitaj grandaj teleskopoj, kies posedantoj postulas po unu penco por travido. Multaj homoj trarigardas tiujn alproksimigilojn super la grandega urbo, la metropolo de Granda Britujo.

La printempa vespera freŝeco pelas nin hejmen kaj ni baldaŭ forlasas tiun ciganan tendaron, kiu en la distanco aspektas kiel mirlando pro la miloj da diverskoloraj lampetoj ĉe karuseloj, standoj kaj budoj.

E. E. Yelland.

Notoj el privataj leteroj de Heinrich Heine.

1823.

La vera poeto ne prezentas la historion de sia propra epoko, sed de ĉiuj epokoj; jen kial vera poemo ĉiuokaze estas la spegulo de ĉiu estanteco.

* * *

Mi tre ŝatus foje aŭdi miajn poemojn kantataj.

* * *

La granda popolamaso kun sia malsaĝa malamo kaj sia teda amo premas mian animon.

1824.

Mia hundeto havas pli multe da saĝo kaj sento ol ĉiuj filozoj kaj poetoj germanaj.

La poeto estas nur eta parto de mi.

1826.

Al Londono sendu filozofon, sed nepre ne poeton.

1842.

La propagando de l' komunismo posedas lingvon, kiun ĉiu popolo komprenas; la elementoj de tiu lingvo universala estas tiel same simplaj kiel la malsato, kiel la envio, kiel la morto. Tio estas tre facile lernebla kaj solviĝos je monda revolucio, la granda duelo de la senhavulo kun la aristokrataro de l' posedo.

1843.

La bonaj edzecoj estas tiel maloftaj, ke oni devus ilin konservi en alkoholo.

1848.

Kia malfeliĉo travivi tian revolucion en mia sanstato! Mi devus esti mortinta aŭ sana.

